

# 3


## KRISTODORNA GLEDIĈIO

*Gleditsia Triacanthos*

 2017

Estas malfacile diveni, ĉu tiu ĉi *kristodorna glediĉio* estas maskla aŭ ina. Ni esperu ĉi-lastan, ĉar tiam, krom la belaj floraj aretoj, tre ŝatataj de abeloj, ĝi provizos nin ankaŭ per longaj guŝoj plenaj je verda, dolĉa kaj en proteinoj riĉa pulpo. Ĉevaloj kaj bovinoj volonte frandas ĝin kaj tiel ili helpas disvastigi la semojn. Ankaŭ musoj, sciuroj kaj diversspecaj musteloj opinias la pulpojn aparte bongustaj, samkiel la kafemuloj, ĉar eblas prepari el ĝi bonegan kafsurogaton. La arbo estis alportita al Eŭropo el Ameriko ĉirkaŭ la jaro 1700 kaj ĝi montriĝis bonega urba arbo, tre imuna al poluado. Fakte kune kun la ginkgo ĝi estas la sola arbo, kiu restas vivkapabla en la ombro de usonaj nubskrapuloj. En Afriko la glediĉio estas vaste uzata por heĝoj pro siaj imponaj pikiloj, kaj la freŝaj guŝoj helpas kontraŭ pulmaj malsanoj. Ho jes: la dornojn mem oni iam kutimis uzi por kalmigi la molarajn dolorajn... bonvolu ne provi fari tion!

[www.josvertelt.nl](http://www.josvertelt.nl)



Ook in andere talen



Also in other languages



Ankaŭ en aliaj lingvoj

